

C.D.E.L.I
Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 549, 1974.04.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni atentigis vin pri la scienca graveco de la arkivejoj kaj studejoj pri interlingvistiko kaj esperanto. Tiurilate ni deziras foje prezenti al vi tion, kio efektiviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- En la jaro 1967 estis statute fondita kiel fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds la interlingvistika arkivejo nomata franclingve *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*. Esperantigo : Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Lingvo Internacia. Mallongigo : CDELI.

Cl.- La celo de CDELI estas la serĉado, konservado, katalogado kaj studo de la libroj, broŝuroj, periodaĵoj kaj arkivaĵoj, kiuj havas rilaton kun la fako planlingvistiko.

A.- La originaleco de CDELI estas, ke ĝin starigis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ adeptoj de aliaj planlingvoj kiel **ido**, **occidental** kaj **interlingua**. Verŝajne ĝuste pro tiu interlingvistika kunlaboro CDELI rapide rikoltis ege abundan kaj riĉan dokumentaron. Ĝi sisteme serĉadas ĉion, kio havas rektan aŭ ioman rilaton kun la temo lingvo internacia.

Cl.- Studentino el la universitato de Ottawa (Kanado) facile trovis en CDELI abundan dokumentaron pri la temo *Esperanto en Ligo de Nacioj*. Tiujn dokumentojn ŝi antaŭe vane serĉadis en la aliaj esperanto-arkivejoj dum mondvojaĝo. Fininte sian dek-tagan studrestadon en La Chaux-de-Fonds ŝi avertis, ke la unuan fojon ŝi trovis esperanto-dokumentejon universitat-nivele gvidatan.

A.- Nun amasiĝas en CDELI prokimume kvin tunoj da materialo. Unua ordigo okazas en subtegmenta konservejo. La arkivaĵoj estas dividitaj en fakojn laŭ sia deveno kaj laŭ bibliografiaj kategorioj.

Cl.- Poste efektiviĝas dua temporaba ordigado. Ĉiujn lundojn matene grupo de libervolaj kaj fakiĝantaj kunlaborantoj venas helpi bibliotekistino de la biblioteko por la katalogado. Jen ni prezentas al vi tiun sindoneman helpantaron :

A.- Estas ĝuste mia edzo, Claude Gacond, kiu okupiĝas pri la ricevado kaj pri la unua ordigado de la materialo, pri la gvidado de la laboro kaj pri la arkivista funkcio.

Cl.- Mia edzino, Andrée Gacond, fakiĝis pri la libroj. Ŝi registras ilian alvenon en katalogoj kaj skizas la aŭtorajn slipojn. Krome ŝi kontrolas la sliparon, kie la libroj, periodaĵoj, broŝuroj kaj arkivaĵoj estas detalege registritaj. Kopio de ĉiu aŭtora slipo estas sendita al la Svisa Nacia Biblioteko.

A.- La bibliotekistino, sinjorino Suzanne Boichat, estas nia konsilantino. Ŝi tajpas la slipojn kaj kontrolas la laboron.

Cl.- Pri la periodaĵoj okupiĝas sinjorino Hélène Berger, prezidantino de Esperanto-Societo La Chaux-de-Fonds. Por ĉiu titolo ŝi atente kontrolas la alvenon de novaj numeroj kaj eblajn mankojn.

A.- Pri la ordigo de la leteroj fakiĝas fraŭlino Mathilde Lüthi, eksinstruistino kaj esperantistino. Por ĉiu leter-skribinto ŝi pretigas dosieron, kie estas vicigitaj la leteroj, kiujn CDELI posedas. En la sliparo tiuj dosieroj estas registritaj kun la nomoj de la leter-ricevintoj.

Cl.- Pri naturalismo okupiĝas sinjoro Alphonse Matejka, redaktoro de la revuo *Cosmoglotta* kaj adepto de la lingvo **occidental**. En la Konsulta Komitato de CDELI li reprezentas la kontraŭ-esperantan tendencon.

A.- Tiun Konsultan Komitaton de CDELI prezidas la poliglota kuracisto Tazio Carlevaro. Li ne nur flue parolas la kvar naciajn lingvojn de Svislando, sed ankaŭ plurajn aliajn idiomojn, inter kiuj la planlingvojn esperanto, ido, interlingua kaj occidental. Li estas konata pro siaj studoj koncerne interlingvistikon.

Cl.- En la trimembra Konsulta Komitato de CDELI esperanton reprezentas sinjoro Claude Piron, ekstradukisto ĉe Mondorganizaĵo pri Sano kaj profesoro en la Universitato de Ĝenevo pri psikologio kaj eduksciencoj.

A.- Ankoraŭ estas mencienda la kunlaboro de sinjoro Reinhard Haupenthal. El Dudweiler, Germanio okcidenta, li gvidas la interlingvistikan libro-servon de CDELI.

Cl.- La tutan aktivecon de CDELI supervidas la direktoro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, sinjoro Fernand Donzé.

A.- Tiu rapida priskribo de la laboro disvolviĝanta en la interlingvistika centro CDELI eble instigos vin fari la neceson, por ke esperantaĵoj el via lando trovu la vojon al la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds en Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !